

SCIENCA REVUO

volas

- (1) subteni la ĝeneralan sciencan nivelon de sia legantaro, pri ĉiaj temoj;
- (2) helpi al la fratiĝo de la homoj, libere diskutigante pri la disigaj konceptoj laŭ sciencaj normoj;
- (3) science studi la problemojn de la Esperantismo;
- (4) evoluigi la lingvon laŭ sciencaj bezonoj, surbaze de la principo de sufiĉo kaj neceso.

Por tiu celo ĝi bezonas ne nur redakcion kaj legantojn, sed ankaŭ verkantojn.

Vidu ankaŭ paĝon 3 de la kovrilo de la unua numero de tiu ĉi jarkolekto.

D-ro W. Manders

INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

ENHAVO

Interlingvistika parto

- | | |
|-------------|--|
| Ĉapitro I | <i>La interlingvistiko kaj Esperanto.</i> |
| Ĉapitro II | <i>La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen.</i> |
| Ĉapitro III | <i>La naturalismo de IALA.</i> |

Esperantologia parto

- | | |
|------------|--|
| Ĉapitro IV | <i>Taskoj de la esperantologio.</i> |
| Ĉapitro V | <i>La evoluo de Esperanto. Lingva korekteco.</i> |
| Ĉapitro VI | <i>Kompara esperantologio.</i> |

prezo 2.25 Ned. guld. / £ —.5.— / \$ —.75

J. MUUSSES — ELDONISTO

Purmerend - Nederlando

Vol. 8-a. N-ro 1-a (29-a)
Paĝoj 1-40
20-4-1956

UDK 001(05) = 089.2(100)

1

SCIENCA REVUO

ELDONO DE J. MUUSSES PURMEREND NEDERLANDO

Sendependa revuo. Aperas kvarfoje jare. Ab.pr. Ned.gld. 5.-, \$ 1.50, aŭ egalvaloro.
Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.)

Redaktoroj: D-ro G. Hamming, D-do G. F. Makkink kaj D-ro W. P. Roelofs. Sekretario de la Redakcio vidu la lastan paĝon. Re prezentanto por I.S.A.E.: G. F. Makkink, Eekhoornlaan 10, Bennekom, Nederlando. Administracia adreso por abonantoj, kiuj ne estas membroj de I.S.A.E.: J. Muusses, Purmerend, Nederlando, Ĝironumero 15062 - Sekretario de I.S.A.E.: S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 nb, Johanneshov, Svedujo, Poŝtkonto 190976.

001(05) = 089.2(100) : 408.9

NIA VOJO

Unu el la celoj de nia revuo estas: science studi la problemojn de la esp-ismo. Speciale nun tiu celo estas aktuala. Ja estas fakto ke nia revuo devas trovi sian lokon en esp-ujo mem. Ĉi tiun fakton la esp-istoj ne vidas, ili ŝajnas opinii ke Sc. Rev. trovu sian lokon ekster esp-ujo en la sciencaj rondoj. Verdire ne nur la esp-istoj, sed ankaŭ la anoj de ISAE ne havas klaran ideon pri la vojo irota. Kompreneble; klaran ideon oni havas nur post diskuto; diskuto pri nia vojo kaj nia situacio ĝis nun preskaŭ mankis. Ĉi tiu kajero de Sc. Rev. volas instigi al plua pristudo.

Nia ĉefproblemo estas ke ni ne havas komunan idealon. Ĝis nun ni ne scias, ĉu deziri normlingvon ĉu interlingvon ĉu simple la venkon de Esperanto. Por montri tion mi mallonge traktu nian historion kaj nian situacion.

Kutime oni distingas inter natursciencoj kaj moralaj sciencoj (aŭ pli trafe: animsciencoj). La fiziko estas naturscienco, la lingvistiko estas animscienco. La diferenco inter natursciencoj kaj animsciencoj estas tiom granda, ke oni malfacile vidas la parencecon. Prenu Plenan Vortaron kaj vidu ke ĝi donas du difinojn de „scienco”. Laŭ la unua difino „scienco” signifas „naturscienco”, laŭ la dua ĝi ankaŭ ampleksas la animsciencojn. Kelkaj lingvoj nomas la animsciencojn: artoj.

Tamen la animsciencoj havas ion komunan kun la natursciencoj: ambaŭ serĉas ordon. La artoj ne serĉas ordon sed esprimovon; esprimovon povas doni ordo kaj malordo, belo kaj malbelo. La tehnikoj ne serĉas ordon sed lerton; eble oni lerte uzos la ordon.

Ambaŭspecaj sciencistoj serĉas ordon, tamen kia diferenco! La na-

tursciencistoj volas ordigi la spertojn pri la naturo; ili kredas ke la vero pri la naturo estas orda. Evitante malordon ili esperas trovi la veron. Karakteriza trajto ilia estas ke ili sisteme malfaciligas sian taskon. Per eksperimentoj ili serĉas spertojn ordigendajn, kiujn la naturo sponte neniam donus. Ju pli da ordigendaj faktoj des pli malfacila la tasko. Sed ĝuste tiuj eksperimentaj rezultoj grandparte kondiĉas la sciencan progreson. La scienco progresas se oni povas rompi tradician opinion kaj fari teorion kun pli ĝenerala ordiga povo.

La animsciencoj serĉas alian ordon. Lingvisto ekz. ne volas ordigi la lingvon sed la lingvuzon: ĉiuj uzu la samajn regulojn *kaj* la samajn malregulaĵojn. La lingvisto instruas ne ordan lingvon sed ian *socian* ordon.

Iom formale ni povas diri, ke lingvisto orde konstatas kaj priskribas la regulojn kaj daŭremajn malregulaĵojn de la lingvo; lia scienca tasko ne estas instrui, sed ordigi. Tamen se iu aŭtoritata lingvisto ordige *konstatas* daŭreman malregulaĵon, la konstato fakte estas ordono por la legantoj (ofte: lernantoj). Per sia instruo la lingvisto ordigadas la uzon de la lingvo; la lingvon mem li nepre ne reguligas. Se iu lingvo laŭ la lingvisto havas haosan gramatikon aŭ vortaron, li nepre akceptas ĝin kiel ĝustan; per sia konservema instruo li eĉ ofte bremsas la spontan reguliĝon.

La sinteno de natursciencisto estas alia. Certe, li volas koni la faktojn pri la naturo; ilin orde konstati li volas. Sed krome li volas konstati la ordon de la naturo; li volas koni la naturon per tiaj nocioj, ke la naturo evidentiĝas esti orda. Eĉ pri la nuraj hazardoj la matematika statistiko serĉas ordan teorion; multajn leĝojn pri la hazardo oni konas. Natursciencisto volas vidi la ordon en la naturo; se lingvisto volus vidi ordon en la lingvo, li devus fari novan lingvon; li ja agnoskas ke la faktaj lingvoj ne estas tute ordaj.

Pri la juro ni povas konstati ion tian. Kompreneble la juristo volas ordigi la leĝaron; sed pli gravas ke la socianoj obeu la leĝojn orde. Se kapablega juristo subite farus tute novan kaj ordan leĝaron, la socio ne povus tuj koni kaj akcepti la novajn leĝajn konceptojn; la socia vivo estus ĥaosa. Do la leĝdonanto devas kompromisi inter ordo en la leĝaro kaj ordo en la socia vivo.

Natursciencistoj ofte minacis la socian ordon rompante la tradicion: influriĉaj grupoj rifuzis aŭdi la teorion ke la suno estas la centro de la planeda sistemo, la ideon ke la tero jam ekzistas dum kelkaj miliardoj da jaroj aŭ la evolucian teorion. Ili protestis eĉ per persekutoj. Pro ilia agado la natursciencistoj komprenis ke la laboro progresas nur se oni estas pretaj riski la socian ordon. Por natursciencisto la tradicio plejparte estas balasto.

Sen tradicio la animsciencoj apenaŭ povas labori. Kio estus historio, lingvo, socio sen tradiciaĵoj; kiel oni povus ĝuste kaj komplete juĝi pri la justo ne konante la tradicion?

La konkludo estas videbla: la natursciencoj serĉas vidi internan ordon, oferante la tradicion se necese; la animsciencoj ofte kompromisas inter ordo interna kaj tradicio, por savi la socian ordon. Same la *normlingvismo* serĉas internan ordon respektante la tradicion nur laŭeble; la *interlingvismo* serĉas kompromison inter ordo interna kaj kelkaj tradiciaj lingvoj.

Ĉu do ĉiu natursciencisto el la helplingvistoj preferas normlingvon; ĉu la interlingvismo havas siajn adeptojn nur inter animsciencistoj? Kompreneble ne! Preskaŭ ĉiu scienco influas al preskaŭ ĉiu scienculo. Natursciencisto vivas sub iu jura sistemo en iu socia ordo, li uzas iun nacian lingvon; animsciencistoj akceptadas la natursciencan tra la tehniko; ili ofte lernis fizikon kaj matematikon ĝis enuigo. Ĉiu homo havas sajn proprajn motivojn kaj sian propran konkludon.

La influon indiki mi volis, kiun naturscienco aŭ animscienco tendencas havi. Mi konstatis la fakton ke natursciencistoj tendencas esti normlingvistoj; animsciencistoj tendencas esti interlingvistoj. Alivorte: natursciencistoj preferas la skemismon; animsciencistoj inklinas al naturalismo. Ĉi tiuj miaj konvinkoj baziĝas sur observoj inter amikoj kaj konatoj, kredeble ĉiu povas havi samajn observojn. Oni nur pripensu ke lingvistoj havis gvidan pozicion en la laboro de IALA kaj ĉe aliaj naturalismaj helplingvoj. ISAE grandparte konsistas el natursciencistoj; Esp-o ja estas relative skemisma.

Natursciencoj kaj animsciencoj instigas al malsamaj sintenoj; ni devas atendi ke la normlingvismo kaj la interlingvismo longdaŭre restados. Inter tiuj du polusoj Esp-o devas serĉi sian vojon; ĝi ja devas servi al ĉiuj homoj; ĝi devas kontentigi ĉies sciencajn aŭ animajn bezonojn. Ni vidu ĉu la postulon oni facile povas plenumi.

Z a m e n h o f volis fari *interlingvon*, lingvon internacian. Ĝin uzu ne nur kleraj okcidentanoj sed ĉiuj tavoloj de ĉiuj popoloj en la mondo. Li tuj komprenis ke interlingvo ne povas esti lingvo inter *ĉiuj* lingvoj; Esp-o estas lingvo inter la eŭropaj lingvoj. Por ke ĝi estu facile lernebla kaj uzebla Zamenhof raciigis kaj sistemigis ĝin. Ja finfine preskaŭ ĉiuj homoj povas kapti kaj ŝati raciaĵojn; estas malfacile, lerni fremdajn malraciaĵojn parkere kaj uzi ilin. Verŝajne neniu malraciaĵo estas komuna al la kelkcent lingvoj de la mondo. Komuna lingvo do devas baziĝi sur komuna trajto homa: la racio.

Tamen Zamenhof ne celis normlingvon; lingva reguleco estis *rimedo* por ke ne-okcidentanoj sufiĉe facile povu uzi la lingvon.

Couturat serĉis *normlingvon*; li estis unu el la pioniroj de la logiko persimbola, la *logistiko*. Ĉi tiu scienco forte progresigis la logikon per tre klara signaro; per same klara normlingvo Couturat volis progresigi la tutan homan kulturon. Ne gravas la historiaj detaloj de la Ido-skismo. Nur gravas ke la konflikto devis veni.

Sciencisto kiu serĉas normlingvon, ne povas kompromisi se lia normo estas laŭ la naturscienca koncepto. Aliflanke, tiu kiu komprenas ke lingvo estas io socia, ne povas ne kompromisi; li ja scias ke la socio baziĝas sur kompromisoj.

La socio ne povas postuli ke la sciencisto respektu la sociajn tradiciojn; la sciencisto ne povas devigi la socion akcepti ordan regulecon. Ni do devas klare distingi inter *normlingvo* kaj *socilingvo*. Ĝis kiam ĉiuj homoj pensos laŭnorme la socilingvo ne povas esti normlingvo; tamen jam nun la sciencistoj devas diri sian konon per laŭeble alcela normlingvo, do la sciencistoj devados ribeli kontraŭ la socilingvo. Jen unu problemo.

La solvo povas esti tiom simpla ke ni apenaŭ povas imagi, kial oni ne tuj trovis ĝin. Ja neniua nacia socilingvo estas konforma al la bezonoj de la sciencistoj. Malgraŭ tio la sciencistoj uzadas la naciajn socilingvojn je sia kontentiĝo; ili havas sian specialan metodon por uzi la lingvon.

Ĉiam samfakanoj havas sian faklingvon. Tiu faklingvo ne estas kompleta; ĝi enhavas nur tiujn elementojn, kiuj mankas en la koncerna socilingvo. Evidente ankaŭ la socilingvo ne estas kompleta. Nu, ĉiu sciencisto uzas miksaĵon el du nekompletaj lingvoj; li metas siajn fakterminojn inter la vortojn de la uzata socilingvo. Por nia celo gravas, ke ĉiu socilingvo finfine akceptas tion. Pro sciencaj motivoj la normlingvistoj volas konstrui normlingvon; tiu normlingvo estos ilia faklingvo, ĝi dum la unuaj jardekoj ne estos kompleta kaj perfekta, ĝi do ne povas esti socilingvo. Se normlingvisto uzas Esp-on kiel sian socilingvon, li jen kaj jen uzos siajn fakesprimojn en la socilingva teksto.

La solvo estas simpla; kial do la idistoj ne trovis ĝin? Pro manko de sperto! Ili ne jam spertis ke Esp-o jam estas socilingvo neŝanĝebla; ili ne jam spertis ke konstruata normlingvo tro rapide ŝanĝiĝas por esti socilingvo, almenaŭ se la koncerna scienco vigle progresas. Ili speciale ne konsideris ke ĉiuj sciencoj progresas per eraroj; finfine la socio akceptu la rezultojn, sed ĝi nepre ne sekvu ĉiujn erarajn detalojn. Tial la normlingvo havu propran vivon apud la socilingvo. Fakte do ne estas konflikto inter la normlingvismo kaj la socilingvo Esp-o. Male, ili povas apogi unu la alian.

Esp-o havas grandan valoron por la normlingvistiko; ĝi estas la plej taŭga elirpunkto por trovi ordan normlingvon. La normlingvistiko po-

vas havi grandan valoron por Esp-o; ĝi avertas kontraŭ nenecesa komplikigo kaj ampleksigo de la vortaro; ĝi povas instigi la esp-isman socion al plua simpligo de la lingvo. Ĉiu lingvo evoluas, la normlingva ideo povas montri la ĝustan direkton.

Dum la konflikto kun Ido la esp-istaro nepre rifuzis fari el sia lingvo normlingvon; ĝi do estu interlingvo. Ĉu vi povas imagi ke la demando ne venus, ĉu ĝi estas la plej lerta interlingvo? Por la esp-istoj ĉi tiu nova problemo ŝajnas ne esti grava. Ni ja opinias ke la avantaĝoj de nova lingvo super Esp-o ne povas esti sufiĉe grandaj por pravigi la rompon de la esp-a kulturo. Ni ne volas senvalorigi nian literaturon, propagandante lingvon kun nur kelkaj avantaĝetoj.

Tamen pri helplingvoj decidus ne nur la esp-istoj; ankaŭ decidus tiuj personoj, kiujn ni serĉas atingi per nia propagando. Multaj varbotoj ne serĉas kontakton kun la esp-a kulturo; ili apenaŭ kredas ke ĝi jam ekzistas. Multaj varbotoj sentas sin pioniroj, kiuj mem respondumas pri la trajtoj de la nova helplingvo. Eble venos la tempo ke ni propagandas por Esp-o dirante, ke nia kulturo estas valorega por la mondo; ĝis nun ni varbas per argumentoj teoriaj. La varbotoj, ne jam varbitoj, demandas al si, ĉu ili povas trovi aŭ fari pli bonan solvon de la lingva problemo. Tiuj, kiuj ne serĉas normlingvon, povas havi jenajn pensojn:

Ekzistas ia internacia vortprovizo; ĝin donis la modernaj scienco kaj tekniko. Preskaŭ senescepte tiu vortprovizo konsistas el grekaj kaj latinaj elementoj. Do iom malprecize ankaŭ tiuj elementoj mem estas internacie konataj. El ili oni faru interlingvon. Sur ĉi tiu ideo baziĝas Interlingue; pri la IALA lingvoj mi supozas la saman. Ni honeste konsentu ke Interlingue havas atentindajn trajtojn. La kohero inter la sciencaj terminoj kaj la komuna lingvo estas pli granda ol en Esp-o. Pli da sciencistoj povas legi Interlingue'n ol Esp-on sen antaŭa studo.

Do kelkaj varbotoj povas kredi ke Interlingue estas pli lerte konstruita *inter* la scienca parto el ĉiuj lingvoj ol Esp-o.

Ankaŭ mi kredas tion; sed ĝuste tial mi ne volas akcepti Interlingue'n. Se mi prenas sur min la taskon, *resti inter* la limoj de kelkaj naciaj lingvoj, mi sentas, kvazaŭ mi metus min en malliberejon. Estis saĝa decido de Zamenhof *starti* inter la naciaj lingvoj; ne estus saĝe restadi sur la startejo. Se Esp-o kuraĝas havi sian propran vivon, ĝi perdos kelkajn *interlingvajn* trajtojn; sed la propra vivo faros la lingvon interesa, ankaŭ tio havas propagandan valoron. Se mi volas resti en la kadro de la nacilingvaj tradicioj, mi povas uzi mian nacian aŭ la anglan, eble baldaŭ la rusan. Kvankam do la interlingvismo miaopinie indikas la ĝustan startejon, mi ne povas akcepti ĝian principon kiel juĝilon por elekti la plej taŭgan internacian lingvon.

Postulante ke internacia lingvo restadu interlingvo inter la plej gravaj naciaj lingvoj, oni postulas ke tiu internacia lingvo neniam estu interesa pro siaj specialaj lertaĵoj, pro siaj klaraj esprimoj, pro siaj puraj sentoj, pro siaj unusencaj vortoj, pro sia vigla vivo. Lingvo estas interesa, se ĝi havas trajtojn, kiujn alia lingvo *ne* havas; *interlingvo* ne povas havi trajton kiu mankas en aliaj lingvoj. Interlingvo povas esti nur antologio el naciaj lingvoj. Se Esp-o kuraĝas havi propran vivon, ĝi povas trovi proprajn formojn, kiuj ĝis nun mankas en la tradicie ligitaj nacilingvoj.

Se novaj ebloj en la lingvo ne estas pliboniĝoj, la esp-a socio nepre ne akceptos ilin; se la esp-a socio ion akceptas, ni rajtas supozi ke la lingvo per tio estas pli akceptebla por varbatoj.

Tion mi opinias ĉar mi estas natursciencisto; mi jam diris ke la animsciencistoj tendencas havi alian opinion; ili konstatas ke Esp-o unuavide ne estas facile komprenebla por multaj sciencistoj, ili konstatas ke interlingvoj pli facile legiĝas sen antaŭa studo. Ili eĉ tendencas opinii ke la normoj pri belo kaj malbelo por internacia lingvo devas esti tiuj, kiuj ankaŭ validas por la naciaj lingvoj.

Mi nun ne volas kontraŭargumenti ke helplingvisto ne serĉas novan lingvon, kiun li facile povu legi, sed iun per kiu li facile povu verki; mi nun ne volas diri ke ne ekzistas normoj pri belo kaj malbelo, kiuj validas por ĉiu nacia lingvo.

Nur tion mi volas diri, ke la argumentoj de la normlingvistoj ne konvinkas la interlingvistojn; la interlingvismo ne kontentigas la normlingvistojn. Internacia kaj intergrupaj helplingvo estu akceptebla por ĉiuj grupoj, aliukaze ni havos la situacion ke kelkaj grupoj havas sian specialan helplingvon.

Estus agrable se ĉiuj grupoj tuj akceptus Esp-on; sed por nia celo jam sufiĉas se tiom granda grupo akceptas kaj uzadas Esp-on, ke ni havadas viglan internacian kulturon per tiu lingvo. Kiu tro multon ĉirkaŭprenas malbone tenas; tion diras la francoj. Estas pli bone, kunigi multajn kaj havi fortan kulturon ol kunigi ĉiujn kaj havi nenian kulturon por ne fortimigi per ĝi kelkajn adeptojn. Nia lingvo devas kontentigi normlingvistojn kaj interlingvistojn, natursciencistojn kaj animsciencistojn; ĝi devas kontentigi klerulojn kaj simplulojn. Sed Esp-o ne povas oferi sian propran vivon por kontentigi ĉiujn; la kompromisoj ne lamigu nin.

Ni tamen ankaŭ ne forgesu ke jam havas kulturan valoron, serĉi kontentiĝon por ĉiuj; ni ne tro facile *elektu* inter diversaj tendencoj, prefere ni solvu la konfliktojn, ni studu ilin ĝis ili malaperos. Inter-tempe nia lingvo vivadu plu.

Resume ni diru, ke la normlingvismo estas laŭ la stilo de la natursciencoj; la interlingvismo estas laŭ la stilo de la animsciencoj. Esp-o estas nek normlingvo, nek interlingvo, sed kompromiso inter ambaŭ. Al ambaŭ grupoj ĝi volas doni kontentiĝon; ambaŭflanke ĝi povas havi konflikton.

La konflikto kun la normlingvismo facile solviĝas se oni konsideras la normlingvismon scienca fako, do akceptante ke tiu fako faras kaj uzas siajn fakterminojn.

La konflikto kun la interlingvismo finfine ankaŭ trovos solvon. Imagu ke la interlingvistoj iam konsentos pri unu uzenda helplingvo, do imagu ke ili ĉesas serĉi la laŭeble taŭgan interlingvon kaj definitive akceptas iun lingvon simple pro la fakto ke ĝi jam ekzistas. Imagu do ke tiu helplingvo ne estas Esp-o. Ilia elekto ne kaŭzos ke Esp-o malaperos, do dum kelka tempo ekzistos du helplingvoj. Ni rajtas supozi ke la natursciencistoj kaj la simpluloj uzos Esp-on; ni imagu ke la animsciencistoj kaj la erudiciuloj uzos naturalisman interlingvon.

Se ĉi tiu situacio daŭrus dum kelkdek jaroj, nepre venus la momento ke la lingvistoj volus studi la komunan lingvon de la natursciencistoj kaj la simpluloj. Jen la solvo.

La nuna konflikto inter Esp-o kaj la naturalismo estas la konflikto inter natursciencoj kaj animsciencoj. Dum la lastaj kelkdek jaroj oni povis sperti ke la natursciencaj sinteno kaj metodo penetras en la kampojn de la animsciencoj. La ekonometrio uzas la natursciencajn metodojn en la ekonomio; en la psikologio oni nun eksperimentas kiel en naturscienco. Kelkaj natursciencaj konceptoj (evolucio ktp) trafis tradiciojn religiajn. *Sub la formo de Esp-o la naturscienca sinteno penetris en la lingvistikon.*

Enirante novan kampon la naturscienca sinteno ĉiam trovadas fortan reziston; ĉiam ĝi finfine venkas. Ja post kelkdek jaroj la koncerna koncepto estas tradicia, do akceptebla por tradiciemuloj. Finfine la normlingvismo venkos super la interlingvismo.

Ĉi tiun jaron Sc. Rev. volas vidigi la konflikton. E. Wüster iel serĉas *interlingvon*. Li ne serĉas ĝin kiel socilingvon; ĝi ne estu vivanta lingvo, sed nur *fonto* el kiu la socilingvoj povu ĉerpi siajn fremdvortojn.

Artikolo mia pri lingva premo kaj religiaj miskonkludoj pledos por *normlingvo*. Mi asertos ke mislingvaĵoj akriĝis kelkajn religiajn konfliktojn. La vidpunkto implicas ke oni ĝustigu la lingvon laŭ taŭgaj normoj por malpliigi pluajn akrajn konfliktojn. La artikolo aperos en la sekva kajero.

Klare mi volas diri ĉi tie, ke la artikolo ne koncernas la ĉiutagan socilingvon. Ĝi enhavas kelkajn normlingvismajn fakesprimojn (ekz.

la pronomon „gi”). Ne eblas konsekvence uzi tiajn esprimojn; ĝenerale oni ne uzu fakterminon se oni ne nepre povas supozi ke la leganto komprenos ĝin. Se mi volus konsekvence uzi la formojn kiujn mi iam ekuzis pro scienca motivo, mi devus remenciadi la signifon de la esprimo, mi devus indiki la lokon kie troviĝas la pravigo de la novformo aŭ novvor- to. Tio estus enuiga.

Krom pledojn por interlingvo kaj normlingvo ĉi tiu kajero enhavas kelkajn tezojn de la Aŭstria Esperanto-Instituto; ili pledas por *simpleco*. Evidente socilingvo devas esti kompromiso.

Kiun vojon iru Scienca Revuo? Ĝis nun la ĉefa celo de multaj esp- istoj estas: varbi novajn adeptojn ĝis finfine iu aŭtoritata organizaĵo decidus uzi Esp-on, tiel donante la finan sukceson. Ĝis nun oni klopodis varbi sciencistojn, imponante per esp-aj artikoloj. Jam oni spertis ke la imponado ne ĉiam efikas; eĉ se iu bonvolas ŝati Esp-on, li ne havas sufiĉajn motivojn kaj tempon por mem lerni ĝin. La plimulto el la sciencistoj havas temporaban profesion. Por instigi al fakta lernado oni devos oferti gravegajn studaĵojn nur per Esp-o. Povus esti tasko de Sc. Rev. doni kolekton da tiaj studoj; mi mem dubegas pri la ebloj kaj pri la efiko.

Alia laboro povas esti pli grava. Esp-o havas du klarajn avantaĝojn super naturalismaj lingvoj. Ni jam konstatis (1) ke ĝi estas taŭga bazo por la normlingva laboro, (2) ke ĝi havas grandan valoron speciale por la simplularo. Speciale la dua fakto povos direkti nian agadon. La rilato inter ni, sciencistoj, kaj la ceteruloj povas esti, ke ni kune volas formi unu popolon kun komuna kulturo. En ĉiuj socioj la scienc- istoj havas la taskon disdoni la sciencajn akiraĵojn kaj klerigi la ce- terajn socianojn. Ni ne rajtas diri ke la sciencistoj gvidas la modernajn sociojn; nepre ni konsciu ke la sciencistoj devas helpi la gvidantojn per scienca analizo de la faktaj problemoj.

Unu grava fakto estas ke ni povas varbi adeptojn per alcela propa- gando. La novajn adeptojn oni povas daŭre ligi al nia idealo nur, se ili trovadas interesan specialan kulturon. Ne plu gravas indiki per kelkaj ekzemploj ke oni povos uzi Esp-on por kultura laboro; nur gravas fakte uzi la lingvon tiucele. *Nun la unua tasko, — ankaŭ por ni —, estas: forĝi esp-an kulturon.*

En moderna socio la liceo grave kontribuas al la kultura vivo; ĝi pli malpli metas la bazon. Ni vidu ke la liceo estas la loko kie sciencistoj disdonas laŭeble klare kaj simple la ĉefajn enhavon kaj trajtojn de la nuna kono. Tia liceo estu Sc. Revuo; ĝin verku sciencistoj, ĝin legu tiuj homoj por kiuj la scienco havas ian valoron.

Sc. Rev. do povas iri du vojojn. Ĝi povas esti kolekto da gravegaj spe-

cialismaĵoj; ĝi povas esti kolekto da artikoloj, kiuj havas instruan va- laron por la leganto, — kaj por la aŭtoro. Klare diri sian konon povas nur tiu, kiu funde pripensis la temon; estas tre utila tasko verki kleri- gan artikolon pri iu temo el sia fako.

Sc. Rev. do povas esti kolekto da specialismaĵoj; ĝi ankaŭ povas esti kolekto da klerigaĵoj. La du ebloj ne havas ion komunan, do ni ne kom- binu ambaŭ eblojn; prefere ni havu du revuojn.

La eldonisto kaj la redakcio de Sc. Rev. preferas ke la nuna Sc. Rev. estu la rimedo per kiu la sciencistoj ofertas sian helpon por formi esp-an kulturon. Ĝi estu la loko, kie la sciencistoj uzas sian konon, siajn metodojn por klerigi la esp-istaron, por solvi niajn problemojn, por formi nian fortan interesan socion.

Ĉiuj esp-istoj, speciale la sciencistoj, konsciu ke neniuj kulturo forta kaj interesa baziĝas sur la deziro al profito kaj utiligo. Estu Scienca Revuo utila por la sciencistoj: ĝia utilo estu la instigo al kultura la- boro. Esp-o mem ne estas iu celo, nur rimedo. La celo estas internacia kompreno, interhoma klareco, tutmonda kulturo. Al tio nia revuo vo- las science kontribui.

Grava problemo restas. Ĉu la sciencistoj per sia revuo povas donaci ion al la esp-istaro se neniuj akceptas la donacon? Ĉu Sc. Rev. povas kontribui al la esp-isma kulturo se la kleraj kaj kleriĝemaj esp-istoj ne abonas ĝin? Nepre ne! Do: *ĉiu kiu opinias ke la scienco povas doni helpon al la esp-isma movado kaj formon al ĝia kulturo, abonu nian Scienca Revuon.*

Estas imageble ke nia nuna vidpunkto ne estas la vidpunkto de la anoj de la ISAE. Nu, ni ne estas diktatoroj. Se la sciencistoj-esp-istoj opinias ke ili ne havas specialan taskon rilate al la scienca bazo de esp-a mondkulturo, ni ne volas trudi nian vidpunkton. Post diskuto ni eble trovos pli bonan vojon.

G. H.

340.6 : 159.964.2 : 615.78 : 343.14 : 323.28 : 340.96

LA „SERUMO” DE VERECO
Prof. D-ro GIORGIO CANUTO
(Prelego farita en I.S.U. Parizo 1950)

Kiam mi devis elekti la temon de mia parolado, ne tro aparte scien- can, sed sufiĉe interesan por la ĝenerala publiko, mi tre volonte ak- ceptis la proponon paroli pri la tiel dirita „serumo” de vereco, ĉar efektive tiu estas en la nuna momento problemo, kiu multe interesis ne nur la scienculojn, kiuj fake pritraktis la aferon, sed ankaŭ la gran- dajn rondojn de la publiko.